

Invito al NOVA URBO (n-ro oktobra 2020)

Komence kelkaj aktualaĵoj. Ĝis la pasinta monato, vikipedia E-versio estis misinforma pri Fokolara Movado. Unue, fine de la tiea paĝo estis ligilo al loko, kiu havis nenion komunan kun Fokolaro. Tion ni korektis kaj la vikipedia administracio akceptis. Estas ankoraŭ kelkaj korektindaĵoj kaj malgrandaj aldonoj, sed tio eble montriĝos realigebla estonte.

Post pli ol 20 jaroj, la Nov-urba “heroldo” ne plu abundos je multaj ilustraĵoj, ĉar la interesitoj trovas ĉion en la reta eldono de “NU”. Anstataŭe ni pligrandigas la publikadon je plurlingveco, kio ankaŭ utilos al reklamo de Esperanto. Komprenoble nia propono al esperantistoj restas aktuala: traduku kion vi trovas interesa kaj disvastigu en via medio.

Malfermite la retpaĝon de “NU” - <https://familiaro.com> vi trovas la jene desegnitajn artikolaron, dividitan je tri kolumnoj :

Translate >>		
FAMILIARO.com		
Artikolo 1	Artikolo 2	Artikolo 3
Artikolo 4	Artikolo 5	Artikolo 6 ...

Supre videblas grafikaĵo de nia blogo “Familiaro” kaj en supra mezo – helverda fenestreto kun la vorto “**Translate**” / traduku. Kiam vi klaketos ĝin, aperas flagoj de tiuj landoj /lingvoj por kiuj okazas aŭtomata traduko de ĈIUJ artikoloj, aktualaj kaj tiuj faritaj en pasinteco. Komprenoble tia “tradukado” estas kruda, foje kun iom kripla stilo kaj eraroj. Tamen ĝi okazas rapidege, senpage kaj en tre multaj linvoj.

Ricevante tian tradukon en via gepatra lingvo, vi povas ĉiam korekti ĝin kaj polurigi – pli facile ol traduki ĉion de la komenco. Hodiaŭ tiuj aŭtomataj tradukoj okazas en jenaj lingvoj:

araba	finna	japana
ĉina	franca	persa
angla	germana	rusa
(Esperanto)	itala	hispana.

Tio povas esti ĝustigita kaj ni aldonos aliajn lingvojn aŭ forigos kelkajn – konsiderante viajn leterojn kaj uzad-oftecon de ĉiu aparta lingvo.

Pasintmonate mortis **Zlatko Tišljar**, honora membro de UEA kaj unu el plej grandaj aktivuloj en la E-movado dum ties lasta duonjarcento. Iom da informoj pri tiu ekstreme aktiva esperantisto vi legos en la artikolo, rete.

Ĉi tie ni citas nur iom da pensoj el lia kuraĝa eseo, titolita

”La rolo de mezkapabluloj en Esperanto-movado”



"En malgrandaj sociaj grupoj kiel ekz. tiuj en nia E-movado, troviĝas malmultaj homoj talentegaj. Rezulte, la gvidan pozicion okupas kutime nur la mezkapablaj. Kvankam talentuloj aperas de tempo al tempo sur landa nivelo, tamen ili ankaŭ malaperas post mallonga tempo. Ĉiu demandas: "Kial?" Ni rigardu la problemon el alia perspektivo. Ĉiuj homoj, do ankaŭ la esperantistoj, vivas en pli vasta socio – la nacio. En tiel natura medio, la mezkapabluloj havas adekvatan por si pozicion, la mezan de grizaj ĉiutaguloj, sen apartaj sukcesoj kaj sen aŭtoritato. Tamen ili facile fariĝas aŭtoritatuloj en E-movado, aŭ pro pli bona lingva kapablo aŭ pro pasiva neglektemo de la simplaj membroj. Laŭtempe ambicio de la aŭtoritata povo kreskas, ĉar la subuloj facile akceptas tian situacion. (...)

Tiel do, almenaŭ dum lastaj jardekoj, ni harmonie stagnas en la "rondo teoria". Ni produktas mezkapablajn gvidantojn, kiuj zorgas, ke la Movado ne pliampleksiĝu, ni produktas mezkapablan tavolon de literaturistoj (duono de nia "popolo" konsideras sin verkistoj, recenzistoj, lingvistoj). Bonŝance, en tiu sektomuro ekzistas truo. Ĝin faras la junularo. En junularaj rondoj oni ne konscias pri la "neceso" flati la mezkapablajn aŭtoritatojn. (...) Alian realan forton kreas homoj el profesiaj organizaĵoj kaj entreprenoj. Ili komprenas la problemon kaj strebas malfermi la Movadon por novuloj, kiuj havas stabilan pozicion en sia nacio kaj aktivus en la publika vivo".

Al ĉi tiu teksto de Zlatko taŭgas verŝajne la populara versaĵo de Julio Baghy:

Verda stelo sur la brusto
Iom palas pro la rusto.
Mi ne estas purigisto
Estas mi esperantisto.

.....

Gramatikon mi ne konas
Kaj gazetojn ne abonas.
Librojn legu la verkisto,
Estas mi esperantisto.

.....

Mi parolas kun rapido:
"Bonan tagon, ĝis revido"
Ĝi sufiĉas por ekzisto,
Estas mi esperantisto.

Por la venko mi esperas,
Sed nenion mi oferas,
Mi ne estas ja bankisto,
Estas mi esperantisto.

.....

Se baraktas en la krizo
La movado, organizo
Helpas mi nur per rezisto,
Estas mi esperantisto.

.....

Post la mort' ĉe tombo mia
Staros "rondo familia".
Nekrologos ĵurnalisto:
"Estis li esperantisto".



La Torĉo – Mia sano, mia ekzerco

Se vi volas teni la korpon sana, tiam ekzercu ĝin. Tiumaniere ĉiu povas celebri la Olimpikan Tagon, almenaŭ unufoje. Sed kial ne fari tion poste?



La Olimpika Tago estas celebrata tutmonde la 23-an de julio. Tiutage okazas multaj sportaj eventoj kun partopreno de junularo kaj ankaŭ de homoj diversaĝaj. Ĝi celas motivigi eble plej multe da homoj al moviĝado kaj per sportaj ludoj inviti al aktiva vivstilo. La Olimpika Tago estas celebrata tutmonde la 23-an de julio. Tiutage okazas multaj sportaj eventoj kun partopreno de junularo kaj ankaŭ de homoj diversaĝaj. Ĝi celas motivigi eble plej multe da homoj al moviĝado kaj per sportaj ludoj inviti al aktiva vivstilo.

Ekde jaro 1987, al Olimpika Tago oni enkondukis la plej ofte uzatan sporton – kuradon. La kuroj okazas je tri distancoj de 5 kaj 10 kilometroj. Krome ĉiu povas paropreni en amuzaj, pli mallongaj kuroj. Nuntempe pli ol 150 Naciaj Olimpikaj Komitatoj (**NOK**-oj) organizas tiutage sportajn eventojn je diversaj niveloj: por infanoj, junularo kaj homoj diversaĝaj. Plurloke tiujn eventojn akompanas ankaŭ artaj ekspozicioj, koncertoj k.t.p. Tiumaniere oni celas fizike aktivigi eble plej multan parton de la socio.

Kompleta artikolo troveblas
ĉe: <https://familiaro.com>

La peniko kaj vivo (Parto 2)


Kelkpersona grupo de biologoj kaj aliaj specialistoj veturis al Norda Atlantiko por esplori profundaĵojn de la oceano. Antaŭ tiu granda aventuro ili faris kelkajn provojn kun du submarboatoj je profundeco de kelkcent 800 metrojn.

Glen Loates: " Mia profunda subakviĝo"

Subskribinte kontrakton kun la renoma magazino 'National Geographic' kaj kun 'The Explorer's Club' (Klubo de Esploristoj), Glen Loates estis invitita al scienca Projekto Beebe kaj la kelkpersona grupo ŝipveturis al Norda Atlantiko. La subakvado estis planita en la kanada provinco Newfoundland (fr: *Terre-Neuve*, eo: Novlando) kaj apud Bermudaj Insuloj. Tie oni uzis submarboaton por esplorado de la oceana profundo. Loates estis vilis ilustru la marestaĵojn, kiuj ili observos tra fenestroj de la submar-ŝipeto "Pisces VI".



Supra bildo: tiel G.Loates pentris la profundaĵon de maro kaj dekstre: interesa E-libreto redaktita de Marinko Ĝivoje.



Post 3 horoj de subakviĝado ni atingis fundon de la oceano. Tie ni pasigis 7 horojn antaŭ ol reveni al la surfaco. Interne de nia submar-ŝipeto la temperaturo falis ĝis 6 gradoj de Celsius. Dum nia descendo, la muroj malseketis kaj knaris. Mi ektimis pro malsekiĝo kaj malvarmo. Mi ne povis labori akvarele kaj povis uzi nur kraĵonon.

Sekve io ŝaltis severajn lumojn. La pli malgrandaj fiŝoj rapidis fuĝi de la brilo, kiun ili neniam antaŭe spertis. Ekstere de tiu lumo, mi rimarkis ion aperi. Ĝi estis granda specio de ŝarko, la ses-branka ŝarko (*Hexanchus griseus*), kiun doktoro Clark volis vidi. Malrapide ĝi proksimiĝis al la logilkaptiloj kaj terurigis ĉiujn aliajn estaĵojn, kiuj provis tuj forkuro. (...) Tiu grandega, pli ol 6-metra "vormaŝino" estas unu el plej danĝeraj rabobobestoj en la planedo. Ĝi frapegis je nia submara veturilo, kaj skuis ĝin. Sekve tiu terura marbesto moviĝis malrapide apud mia fenestreto. Mi ne povis vidi ĝin la tuta, ĉar tiu monstro estis tro granda.

Kompleta artikolo troveblas ĉe: <https://familiaro.com>

Unuiĝintaj Nacioj jubileas la 75-jariĝon

La 24an de oktobro 1945, en San Francisko (Kalifornio) 50 ŝtatoj subskribis Ĉarton de la Unuiĝintaj Nacioj kaj tiun daton oni rekonas kiel naskiĝtago de la ĉefa tutmonda organizaĵo. Ratifikis ĝin 50 ŝtatoj (kvar potencaj aliancanoj: Usono, Britujo, Sovetunio, Ĉinio kaj 46 aliaj).




Nuntempe al UN apartenas 193 ŝtato-membroj kaj, krom la ĉefa sidejo en Novjorko (ekskluzive internacia teritorio), la organizaĵo havas du oficejojn en Eŭropo (Ĝenevo / Svislando, kaj Vieno / Aŭstrio) kaj unu en Afriko (en Kenia ĉefurbo Nairobi).

Esencan parton de la OUN formas Porpacaj UN-trupoj (PUNT) – nomitaj *bluaj helmetoj* aŭ *bluaj beretoj*), kiuj intervenas en regionoj suferantaj pro militoj aŭ en kazo de naturaj katastrofoj. Ekde 1948, la UN-pactrupoj protektis homojn pli ol 70-foje en diversaj tragediaj okazintaĵoj. En tiuj pac-protektaj operacioj servis ĉ. 750 mil soldatoj el 110 landoj, inter kiuj preskaŭ 2300 perdis la vivon. En jaro 1988, la PUNT ricevis Nobel-premion por la aktivado serve al mondpaco.

Kompleta artikolo troveblas ĉe: <https://familiaro.com>

KinARTO: Fabela dokumento

Ni volas prezenti al vi la filmon, kiun ni vidis dum speciala vespero en malgranda kinejo. “**Miellando**” estas la makedona filmo pri unu forgesita angulo en Eŭropo. Reĝisoris ĝin pasintjare Ljubomir Stefanov kaj Tamara Kotevska sub la titolo: „Медена земја” (:medjena zemja). Ĝi rakonas pri vivo de soleca virino kiu vivas en izolita vilaĝo. Ŝi vivtenas sin kaj la patrinon nur per rikoltado de mielo. Oni taksis la filmon: “hipnote bela, kvankam amara”.



Ŝajnas, ke laŭintence la filmo estis farata kiel dokumento, tamen ĝi magie altiras atenton pro beleco, bonege fotita en la severa montara medio. Hatidze Muratova estas abelbredisto aŭ, pli precize, abelĉasisto kiu kolektas mielon de sovaĝaj abeloj. Muratova trovas ĝin en arbokavoj aŭ montaj fendoj, sed ŝia vivo ne estas dolĉa. Ŝia laboro en senhoma montaro estas malfacila kaj foje danĝera. Somero varmegas kaj vintra sezono abundas je frostaj ventoj. Ŝiaj tagoj estas monotonaj kaj - laŭ grandurba laŭta vivo - malgajaj, kion emfazas maloftaj dialogoj kaj manko de komentoj.

Muratova loĝas kun sia malsana patrino en kaduka, unuĉambra kabano. Solan lumon donas tie nur unu kandelo, sed ekstere la steloza ĉielo kaj silento kreas neforgeseblan impreson. La tagoj pasas en kolektado de mielo, kiun ŝi enboteligas kaj portas al ĉefurba foiro de Skopje.

Fortoj de la vivo:

Reveno al vivo familia

Enamiĝinte al iu en laborejo, mi forlasis mian familion. Blindigita per la pasio, mi ne komprenis kian doloron mi kaŭzas por mia familianoj. Mi daŭrigis kontakton kun la infanoj, ĉefe kun mia plej aĝa filino, kiu ege suferis pro mia malĉeesto. Kiam ŝia edzo forlasis ŝin kun tri malgrandaj infanoj, mia filino falis en malesperon. Tiam mi konsciiĝis ke ripetiĝas tia sufero, kiun mi mem kaŭzis al miaj proksimuloj. Dio donis al mi la ŝancon kompreni kaj penti por tiu misago.

Mi faris ĉion por esti proksima al la rompita familio de mia filino. Trovinte la bofilon, mi longe interparolis kun li. La bofilo humiligis min dirante, ke mi ne rajtas juĝi ĉar la traŭmoj de lia edzino (t.e. de mia filino) estas parte mia kulpo. Ilia geedzeco disfalis ĝuste pro manko de ekvilibro en ŝia vivo. Mi surgenuiĝis kaj petis kun larmoj, ke li pardonu min. Li diris, ke pripensos tion. Post kelkaj monatoj monatoj de maltrankvila necerteco, aperis esperlumeto: mia filino informis, ke ŝia edzo (mia bofilo) pretas reveni kaj provos denove loĝi kun sia familio.

(C.M. – Argentino)

Nova direktoro

En sia programa prezentaĵo nia nova direktoro parolis pri la firmao kiel familio, kiu estas ĉies respondeco. La etoso fariĝis facila kaj amikeca ... ĝis kiam aperis unuaj malfacilaĵoj – eble pro spertomanko de la homoj, kiujn li elektis laŭ sia plaĉo. La direktoro fidis nur al ili kaj, farante diversajn decidojn, li tute ne konsideris opiniojn de la ceteraj. Sentinte solidarecon kun miaj gekolegoj, mi volis ŝati ankaŭ la direktoron. Eble tio estis la ĝusta sinteno, kiu kuraĝigis min eniri lian oficejon kaj demandi: “Sinjoro, kiaj problemoj kaj obstakloj vin premas?” Tiumomente li aspektis tute alia homo, kompare al tiu nefidema, kiu ekde la komenco vidis nur malamikojn. (Eble ni mem kaŭzis tiun lian konduton?) Fine de nia interparolo li diris, ke atendas lin urĝa tasko kaj petis min eliri.

Post kelkaj tagoj la direktoro telefonis al mi kaj petis pardonon. Li dividis kun mi siajn problemojn kaj la senpovon kunlabori kiam ĉio forglitis inter la fingroj. Surprize, li ankaŭ petis ke mi helpu. Responde mi konsilis, ke li malfermiĝu al ĉiuj kaj demandu ĉu ili volas partopreni en lia nova projekto. Tio estis la turnopunkto, momento de la reciproka kompreno. Grandaj ŝanĝoj okazis.

(H.G. – Hungario)

*

“**Nova Urbo**” (Città Nuova / New City) estas internacia socikultura magazino de Fokolara Movado, kiu antaŭenigas ideojn kaj konkretajn projektojn serve al reciproka kompreno kaj unueco en familioj, komunumoj kaj – je pli vasta skalo – inter homoj de diversaj nacioj, kredoj kaj sistemoj.

Città Nuova /New City eldoniĝas ĉe Internacia Fokolar-Centro en Italio kaj aperas en multaj aliaj lingvoj /landoj: ARGENTINO - *Ciudad Nueva*; AŬSTRALIO - *New City*; BELGIO - *Nieuwe Stad*; BRAZILO - *Cidade Nova*; BRITUJO - *New City*; BULGARIO - *Nov Svjat*; ĈILIO - *Ciudad Neava*; ĈINIO (Hongkongo) - *San Sin Seung*; DANLANDO - *Ny Stad*; **ESPERANTUJO** - *Nova Urbo*; FILIPINOJ - *New City*; FRANCUJO - *Nouvelle Cite*; GERMANIO - *Neue Stadt*; HISPANIO - *Ciudad Nueva /Ciutat Nova* (en kataluna lingvo); HUNGARIO - *Uj Varos*; JAPANIO - *Uno*; KANADO - *Nouvelle Cite*; KENIO - *New City /Nouvelle Cite*; KOLOMBIO - *Ciudad Nueva*; KOREUJO - *Kumul*; KROATIO - *Novi Svijet*; LIBANUJO - *Citte Nouvelle*; NEDERLANDO - *Nieuwe Stad*; OCEANIO - *New City*; POLLANDO - *Nowe Miasto*; PORTUGALIO - *Cidade Nova*; RUMANIO - *Oras Nov*; SLOVAKIO - *Nove Mesto*; SLOVENIO - *Novi Svet*; SVEDIO - *Enad Värld*; SVISLANDO - *Citta Nuova*; URUGVAJO - *Ciudad Nueva*; USONO - *Living City*; VENEZUELO - *Ciudad Nueva*.